CNT — AIT — FAI

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

# INFORMA BULTENO

NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO

ADRESO: ESPERANTO-FAKO AV. DURRUTI 30
BARCELONO — HISPANIO

IBERIA ANARKISTA FEDERACIO

**Informa Bulteno #3 Aŭtuno-2023**

# HALTIGU LA BARBARECON !

Denove la milito ekflamas en la Palestina/Israela regiono. Ĉi-foje la Hamaso prenis la iniciativon komenci la barbarecon. Ĝi ne estas sola en tiu atako, ankaŭ sturmantoj de la FPLP partoprenas la armitajn agojn. La bildoj estas neelteneblaj: civiluloj murditaj sur la stratoj aŭ hejme, ostaĝigoj.

Kvankam la israela registaro kondukas politikon kvalifikitan apartismo, eĉ de la eks-direktoro de la israelaj spionservoj Tamir Prado, tio tute ne pravigas plenkonsciajn murdojn de civiluloj. Tio estas tiel kondamnindaj kiel mortigo de palestinaj civiluloj fare de la israela armeo !

Sendube, la milita respondo de la israela registaro estos same terura kaj blinda. Jam konstruaĵoj de Gazao estis bombaditaj kaj elektro estas interrompita en la tuta teritorio.

Ni nur povas esprimi la plej grandajn timojn por la civilaj loĝantoj, palestinaj kaj israelaj, ostaĝigitaj de la iliaj respektivaj registaroj en tiu konflikto kaj tio, dum tiuj loĝantoj manifestaciis de monatoj kontraŭ siaj propraj registaroj kaj ties mortigaj politikoj: dum la lastaj semajnoj, kaj precipe la pasintan 30an de julio, miloj da Palestinanoj manifestaciis en Gazao kontraŭ la politiko de la Hamaso per la slogano « ni volas vivi ».

Samtempe en Israelo, dekoj da miloj da israelanoj multfoje surstratiĝis kontraŭ la politiko de la dekstra registaro, kiu ne plu kapablis kontroli la manifestaciojn kaj direktiĝis al kolapso.

La atako de la Hamaso do okazas, kiam – ambaŭflanke de la muro de la honto – la loĝantoj komencis memorganiziĝi kontraŭ siaj estroj.

La perforto senbridigita de tiu atako tute male unuigos la loĝantaron ĉirkaŭ tiuj koruptitaj estroj, plifortigante la naciismajn sentojn nutratajn per deziroj de reciproka venĝo.

En Gazao, la Hamaso alvokas la sakralan unuiĝon malantaŭ sia flago. Jam Netanjahu anoncas registaron de nacia unuiĝo ; la miloj da rezervistaj soldatoj, kiuj strikis de semajnoj anoncis interrompon de sia movado !

Tiu atako aliparte intervenas, dum la ĉefo de la Hamaso renkontis la ajatolon Ali Khamenej en Teherano pasintan junion, kaj ke Sauda Arabio – reĝimo malamegata de Irano – interdiskutas kun Israelo por starigi oficialajn rilatojn. Jam la Hizbulaho, terorisma marioneto de Irano, anoncis, ke « la ofensivo de la Hamaso kontraŭ Isralеo konsistigas mesaĝon al tiuj, kiuj provas normaligi siajn rilatojn kun Israelo por esprimi, ke la palestina lukto ne mortas ».

Post la israela loĝantaro, ja la loĝantaro de Gazao pagos la prezon de tiuj sangoplenaj ludoj inter Ŝtatoj por certigi sian potencon.

Unu plian fojon tiuj, kiuj decidas militojn ne estas tiuj, kiuj mortas en ĝi…

Unu plian fojon, la civiluloj suferos, de Sderoto ĝis Gazao. Ĉiuj ĉi ideologioj uzitaj de la potenco, nome naciismojn kaj religiojn, estas la pilieroj de tiu mortiga logiko, kiu instigas la homojn intermortigi sin por la plej granda profito de la estroj de tiu mondo.

**CNT-AIT**

http://cnt-ait.info/2023/10/09/halte-a-la-barbarie/

*dankon al nia amiko http://neniammilitointerni.over-blog.com pro la traduko*




**Bildo: Dum la Kovima pandemio, la flegistinoj de la malsanulejo Ramdam portas esencan mesaĝon: « Ni rifuzas esti malamikoj ! Por paco justa kaj daŭra ! »**

---

*Anarkiisma solidareco transpasas Ĉiujn limojn, murojn, subpremojn kaj registarojn.*

# LA INSULO DE MALBONO




La insulo Sicilio kaj ĝiaj insularetoj en la baseno de Mediteranea maro ĉiam ludis ŝlosilan rolon en internacia geopolitiko pro sia geografia pozicio, natura ponto inter la arabaj, afrikaj kaj eŭropaj popoloj kaj hodiaŭ la suda pordo al fortikaĵo eŭropo kun sia sekurecaj, segregatismaj kaj repuŝadaj migraj politikoj.

La tentakloj de la usona imperiisma domino submetas Sicilion dum 80 jaroj instalante armeajn bazojn kaj pikdratojn sur la insulo kaj reduktante ĉi tiun teritorion al armea servuteco en la servo de Usono kaj NATO.

En 1943 okazis la surteriĝo en Sicilio de la “aliancitaj” trupoj dank’ al la interkonsentoj inter la usonaj militestroj, la sekretaj servoj kaj la mafio, legitimita kiel politika-institucia ento. Hodiaŭ Sigonella kaj Niscemi estas la mondaj ĉefurboj de droneoj kaj centroj de ofensivaj strategioj en la militoj batalitaj de Usono kaj NATO en mezoriento, nordafriko kaj ĉe la limoj de eŭropo.

En Sigonella troviĝas la *NAS Naval Air Station*, la plej grava armea bazo en Mediteraneo, kun ĉasaviadiloj, deponejoj de nukleaj armiloj, centoj da soldatoj, senpilota aviadiloj, mortdroneoj kapablaj flugi super duono el la mondo senĉese dum 36 horoj kaj spioni milojn da km2, kolektante informojn kaj prilaborante datumojn kun mortiga precizeco. Aviadiloj kapablaj je benzinumado dumfluge multobligante la efikojn de potenco sur ĉiuj militniveloj. Teknologioj kaj infrastrukturoj en kontinua pliboniĝo kaj ekspansio.

En Niscemi, ene de la *Natura Rezervo La Sughereta*, grava arbaro de konsiderinda naturalisma kaj pejzaĝa valoro, la *Naval Radio Transmitter Facility NRTF* funkciigas ekde 1991, 46 antenoj kiuj certigas la telekomunikadojn de la surfacaj, submarŝipoj kaj aeraj fortoj de la mararmeo de Usono tutmonde.

En 2012, ene de la naturrezervejo, Lockheed Martin kaj mafiaj kompanioj ankaŭ konstruis la MUOS – Mobile User Objective System, tri tre sofistikajn satelitajn telekomunikajn parabolita antenojn posedataj kaj uzataj ekskluzive de la usona armeo, kiuj kune inkluzivas kvin geofiksajn satelitojn kaj kvar terstaciojn situantajn en ĉiu angulo de la globo, kapablaj kontroli ĉiujn komunikadojn de la militveturiloj de la US Navy. La aliaj bazoj situas en Aŭstralio, Virginio kaj Havajo.

Ĉiam pli disvastiĝas la enmiksiĝoj kaj kondiĉadoj kiujn la militaj aparatoj efektivigas kapilare en nia socio, celante mistifiki kaj kaŝi ĝiajn rolojn kaj celojn; ĉiutagaj ĉeestoj en edukaj kaj trejnaj spacoj por disvastigi kulturon de “ordo kaj disciplino”, de pasiva akcepto aŭ entuziasma aliĝo al la masklismaj valoroj de militismo, uniformita perforto, subpremo de la malfortuloj, milito kontraŭ la “malamiko ekstere” kaj la “malamiko interne”. Grandegaj investoj en projektoj kunduobla celo, civila kaj milita, je la servo de la armilindustrioj, de ŝtatoj kaj diktatoraj reĝimoj kiel Turkio kaj Israelo kaj de novkoloniismaj energikompanioj kiel ENI, kiu venenas la naturon kaj for-rabas krudaĵojn en Afriko kaj aliloke sub la protekto de la itala armeo en “paca misio”.

Resursoj forpreni de la plibonigo de publika sano, subtenebla movebleco, la reakiro de poluitaj areoj, la sekureco de teritorioj je hidrogeologia risko, organika kaj proksimeca agrikulturo.

Anstataŭe, la politika klaso volas altrudi la lokaj loĝantaroj la konstruadon de ponto super la Mesina mar-kolo, kiu ligu Sicilion al la resto de la duoninsulo. Projektego de spekulado kaj korupto, senutila kaj malutila, kun la celo plibonigi la armean vojaron kaj ne por kontentigi la realajn bezonojn de tiuj kiuj loĝas en ĉi tiu loko.

La militarigprocezo de Sicilio malobservas la rajton al sano, memdeterminado kaj reprezentas minacon al paco kaj kunvivado inter la popoloj de la mediteranea areo.

Ĝi estas hegemonia projekto de totala kontrolo de tutmondaj rimedoj per la senskrupula uzo en milito. Ĉiam pli ciferecigita kaj malhumaniganta senĉesa milito.

Ekde 2009 multaj NO MUOS-komitatoj estis starigitaj por rezisti kontraŭ ĉi tiu militmaŝino ĉar tiuj antenoj estas tre danĝeraj por la sano de homoj, bestoj, plantoj kaj la natur-medio pro la neelteneblaj emisioj de elektromagnetaj ondoj. Inter la loĝantaro estis eksponenta kresko de leŭkemio, tumoroj, limfomoj, genetikaj misformaĵoj, ktp.


Ekde tiam protesto estis farita por postuli la malmuntadon de MUOS kaj la fermon de la armea bazo. En la lastaj jaroj okazis multnombraj rektaj agoj faritaj kontraŭ la bazo, invadoj, grimpado kaj damaĝo al la parabolitoj, vojbaroj, tranĉado de bariloj, kiuj kostis malliberejon, monpunojn kaj elpelojn por la implikitaj geprotestintoj.

La kolektivo *No Muos*, kiu rekonas sin en la esencaj valoroj de libereco, egaleco, solidareco, kontraŭfaŝismo kaj kontraŭrasismo, per persona partopreno, propagando kaj rekta agado volas ke Sicilio estu en la centro de Mediteraneo de paco, kie popoloj renkontiĝas, interŝanĝante siajn kapablojn, spertojn kaj siajn kulturojn, ekster rilatoj de ekspluatado, hegemonio kaj subpremado.

La nura armeo bezonata estas armeo de arbargelaboristoj, kiu iru labori en la brulantaj montoj. La nura utila armeo estas armeo de geenmigrintoj, kiu iru por repopoladi forlasitajn vilaĝojn. La nura bonvena armeo estas tiu de milionoj da elmigrintaj gelaboristoj norden kaj eksterlande por ke ili povu reveni al siaj propraj urbetoj, el kiuj ili estis devigitaj fuĝi. La nura armeo kiun oni bezonas estas armeo de gekuracistoj, kiuj povas alporti kuracadon al la teritorioj de forlasitaj vilaĝojn. La fisoldat-servoj ne defendas la pacon, la veraj geherooj estas la gedizertintoj.

**Giuseppe**

## Glumarko en Esperanto!




Se vi deziras ricevi ĉi tiun glumarkon, skribu al CNT-AIT 7 rue St Rémesy 31000 TOULOUSE (FRANCIO) aŭ retpoŝte al contact@cnt-ait.info indikante la kvanton, kiun vi deziras ricevi (10, 20, 50), ni vin respondos per sendokostojn

---

## Saint-Etienne [Francio]: Solidareco kun sociaj malliberuloj!

En St Etienne kiel ĉie en Francio, subpremo falis sur tiuj kiuj kuraĝis esprimi sian koleron post la murdo de Nahel. Ĉi-sube estas resumo de informoj legitaj en la fejsbuka paĝo de Le Gueuloir, amaskomunikilaro el Saint-Etienne kun liberecanaj tendencoj (https://facebook.com/legueuloirjournal):

9 homoj estis juĝitaj la 4-an de julio. Ĉiuj alvenas el antaŭprocesa aresto el la malliberejo de Talaudière. Ĝeneralaj rimarkoj: advokato levas la multnombrajn neregulaĵojn en la proceduro… Sed tion ne retenas la prokuroro: estis 42 arestoj tiuvespere kaj konsiderante la situacion, por li tio estas “cirkonstancoj perfekte nesupereblaj”. La akuzisto do pravigas la nerespekton de la leĝo, kiam ĝi konvenas al la Ŝtato… Etoso…

La sama advokato ankaŭ mencias, ke ŝiaj du klientoj[1], suferis batojn kaj vundojn, vidas policajn batojn dum la aresto, kiujn ŝi notis pro ilia stato en policgardo (Garde à vue, GAV) – kelkaj ankoraŭ havas spurojn en tribunalo. Ĉi tio ŝajnas ne ĝeni iun ajn flanke de la Juĝistaro…

[…] La plimulto de la akuzitoj laboras. Iuj havas puran krimliston, aliaj ne, aŭ estas ripetaj deliktuloj pri tio, pri kio ili estas akuzitaj.

La advokatoj diros, ke tio ne estas “la kutima profilo de homoj kiuj iras al tribunalo”, kaj ke por faktoj kiel tiuj juĝitaj, “kun tia profilo”, la justeco kutime ne estus petinta malliberecan punon.

ĉiuj estas kondamnitaj al malliberejo. Aranĝoj eblas por tiuj, kiuj laboras (en la laboro tage, en malliberejo por dormi). Atendante ke la juĝisto prenu sian decidon (li havas 5 tagojn por fari tion), ĉiuj revenis al malliberejo.

Kelkaj ekzemploj de kondamno, kiuj montras la “ekzemplan” kaj neplaĉeblan severecon de la frazoj:

– 1 jaro en malliberejo por juna 18-jara bakisto, inkluzive de 7 monatoj en efektiva malliberejo;

– 6 monatoj da elektronika braceleto por juna laboristo;

– Kaj pro 4 paroj de okulvitroj, 33-jara marokano estis kondamnita al 1 jaro da malliberejo kaj malpermesita el franca teritorio.

Kompare, la urbodomo de Saint-Étienne deturnis dekojn da miloj da eŭroj da publika mono por organizi homofoban seksbendon ĉantaĝon, sed justeco ne estos tiel severa kaj rapida. Por kio ? Ĉar “justeco” ekzistas por protekti la ŝtaton kaj posedaĵon. Ĝi estas subprema klasa kaj rasisma ilo, ĝi servas por puni kaj forigi el la socio ĉiujn ribelantojn kaj marĝenulojn.

***CNT-AIT Francio***

---

## Manifestacio en Karaĉio (Pakistano) por protesti kontraŭ la mortigo de senkulpaj homoj en Israelo kaj Gazao



---

**Ĉi tiu bulteno estas verkita kaj redaktita de kunuloj anarkiistoj. Se vi ŝatas la bultenon, afiŝu ĝin en sociaj retoj, fotokopiu kaj disdonu ĝin**

**Por partopreni: contact@cnt-ait.info**
**https://informabulteno.wordpress.com/**

---

[1] kaj certe multaj aliaj sed la aliaj advokatoj ne parolas pri tio… multaj advokatoj de la tribunalo, kiuj faras la minimumon kiam ili ne akuzas la akuzitojn…

## Marto 8: Memoru la kuraĝajn virinojn de Afganio, Irano kaj Pakistano, kiuj luktas kontraŭ siaj faŝismaj reĝimoj kaj patriarkeco



En la Internacia Tago de Laboristaj Virinoje, ne forgesu la kuraĝajn afganajn, iranajn kaj pakistanajn virinojn pro sia lukto kontraŭ faŝismaj reĝimoj kaj patriarkeco . Ni esperu pli bonan mondon, kie ni ĉiuj sen




Ni staras kun la virinoj de Irano.




Donu al afganaj virinoj la rajton je edukado kaj vivo !

tas nin sekuraj kaj amataj.

## Solidareco kun rusaj kontraŭmilitismaj kaj anarkisindikatismaj

Ĉiu opinio kiu diferencas de Kremla propagando estas konsiderata kontraŭleĝa kaj tiuj, kiuj kuraĝas esprimi ĝin, alfrontas ĝis dek kvin jarojn da malliberejo. Nia tuta solidareco kun niaj rusaj kontraŭmilitismaj kaj anarki-sindikatismaj kamaradoj.

## Ni helpu la Anarkiistojn en Ukraino rezisti kontraŭ la milito kaj la vintra malvarmo !

Assembleia estas reta anarkiisma amaskomunikilaro el Kharkov, Ukrainio (https://assembly.org.ua). Ekde la agreso de la Rusa Federacia armeo, ĉi tiuj kunuloj tenas firme la anarkiisman kaj internaciistan standardon en dramaj cirkonstancoj.

Sub la bomboj de la Rusa Federacio, ili partoprenas en agoj de bazsolidareco kaj civila rezisto, sen sinki en subtenon por la ukraina registaro. Male, ili konservas kritikan starpunkton al ukraina Ŝtato kaj ĝiaj estraroj (de nacia ĝis regiona kaj loka), elmontrante la korupton de la diversaj niveloj de administrado kaj de enlandaj militprofitantoj. Assembleia daŭre donas informojn al laboristoj kaj kritikas lokajn estrojn, kiuj profitas la situacion por ekspluati eĉ pli la laboristojn.

Assembleia subtenas laŭte kaj klare la anarkiismajn, kontraŭ-statismajn kaj kontraŭ-militismajn principojn, dum la plej multaj el la "anarkiismaj" individuoj kaj grupoj en Ukrainio ĵetis ĉiujn principojn eksterŝipen tuj kiam la invado komenciĝis.

Pro la detruo de esencaj infrastrukturoj fare de la rusa armeo, la hejtado certe mankos al la kunuloj, dum la vintro kutime estas aparte severa en ĉi tiu mondoregiono. La energiproblemo, kiu jam influas multajn el ni, ekestiĝos tie eĉ pli dramece. Tial ni lanĉas urĝan alvokon por solidareco kun la kunuloj de Assembleia por helpi ilin kiam la vintro alproksimiĝas:

- vi povas fari interretajn donacojn sur ilia platformo: https://www.globalgiving.org/projects/mutual-aid-alert-for-east-ukraine/

- vi ankaŭ povas sendi bankĉekojn en eŭroj pagotaj al CNT-AIT (menciu "Solidarité Ukraine" sur la dorso) al CNT-AIT, 7 rue ST Rémésy 31000 TULUZO.

- vi povas fari banktranspagon (en eŭro) al la sekva konto (bonvolu sendi retmesaĝon al contac t@solidarité.online por informi nin pri la banktransigo):

IBAN: FR81 2004 1010 1603 1175 7H03 7 45 BIC: PSSTFRPPTO

Konto posedanto: CNT-AIT / Banko: la Banque Postale

***La kunuloj kaj kunuloj de la iniciato Olga Taratuta***

http://nowar.solidarite.online/blog
contact@solidarite.online

